

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiunonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 9.—OKTOBRO 1928



Tipaj kostumoj.—SEVILLA

VII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

BAJO LA DIRECCIÓN DE LA «SOCIEDAD ESPERANTISTA ESPAÑOLA» Y ORGANIZADO POR EL «GRUPO ESPERANTISTA SEVILLANO», COMO CONTINUACIÓN DE LOS ANTERIORES CONGRESOS DE BARCELONA (1920), ZARAGOZA (1921), VALENCIA (1923), BILBAO (1924), CÓRDOBA (1925) Y MADRID (1926), y

1^{ER} CONCURSO LITERARIO INTERNACIONAL ESPERANTISTA

ORGANIZADO POR LA «SOCIEDAD ESPERANTISTA ESPAÑOLA» CON MOTIVO DE DICHO CONGRESO

EN SEVILLA

DEL 5 AL 9 DE NOVIEMBRE DE 1928

KONGRESEJO:

REAL SOCIEDAD ECONÓMICA SEVILLANA DE AMIGOS DEL PAÍS
Salón de Actos. Calle Rioja. núm. 25

PRESIDENTE HONORARIO

S. M. el Rey Don Alfonso XIII (q. D. g.)

VICEPRESIDENTES HONORARIOS

S. A. R. el Serenísimo Señor Don Carlos de Borbón y Borbón, Infante de España y Capitán general de la 2.^a Región.

Eminentísimo y Reverendísimo Cardenal Arzobispo de Sevilla.

Excmo. Señor Gobernador civil de la Provincia y Comisario regio de la Exposición Ibero Americana.

Excmo. Señor Presidente de la Excma. Diputación Provincial.

Excmo. Señor Alcalde del Excmo. Ayuntamiento de Sevilla,

MIEMBROS DE HONOR

Excmo. Sr. D. Carlos M.^a Cortezo, Presidente del Consejo de Estado.

Excmo. Sr. D. Manuel Blasco Garzón, Presidente del Ateneo de Sevilla.



Supra parto de la Hiraldo

Excmo. Sr. D. José Gastalver Gimeno, Presidente de la Real Sociedad Económica Sevillana de Amigos del País.

Sr. D. Alfonso Trías de Mellado, Concejal del Excmo. Ayuntamiento de Sevilla.

MESA PRESIDENCIAL PARA LAS SESIONES DEL CONGRESO

Presidente efectivo: D. Francisco Azorín Izquierdo.

Vicepresidente primero: D. Vicente Alonso Sanz.

Vicepresidente segundo. Señorita María Franco del Capblanco.

Secretario: D. Mariano Mojado.

Vicesecretario. D. Carlos Martínez Fernández.

Contador: Señorita Enriqueta Escacena Bermejo.

Tesorero: Don Emilio del Barrio Martín.

COMITÉ CENTRAL DIRECTIVO DE MADRID

Presidente: D. Vicente Alonso Sanz.

Secretario: D. Julio Mangada Rosenörn.

Vocales: D. Mariano Mojado, D. Julián Sosa, D. Luis R. Escartín,
D. Carlos de San Antonio López y D. Pedro Gil Arrué.

COMITÉ LOCAL ORGANIZADOR DE SEVILLA

Presidente: R. P. Jerónimo de Córdoba.

Vicepresidente: D. Enrique de Uriarte.

Secretario-Tesorero: D. Carlos Martínez Fernández.

Vocales: D. Cristóbal Rodríguez Pérez, D. Fernando Coello, don
Luis del Valle, D. Miguel Moreno Castillo y D. Antonio Mármol Cor-
dero.

ASUNTOS PARA TRATAR EN EL VI CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN SEVILLA

1.º Conveniencia de que se pague la cuota de H. E. A el año anterior.

2.º Que todos los Grupos esperantistas establemente organizados se adhieran a H. E. A. y cuota que deben pagar.

3.º Que se procure formar Grupo donde haya siquiera CINCO samideanos.

4.º Límite máximo de tiempo para contestar a una comunicación oficial.

5.º Qué homenaje convendría hacerse al señor Codorníu.



Portiko de la Preĝejo de l'kastelo.—ARACENA

6.º Creación de una Estrella esperatista de honor para darla en cada Congreso.

7.º Que se reúnan las ACTAS de todos los Congresos anteriores y se remitan a la Secretaría de H. E. A. para formar un Libro de Actas de los Congresos.

8.º Proposición de D. Luis Campos sobre el Voto de los Congresos.

9.º Formación de un Anuario Esperantista Español.

10. Revisión de los Diccionarios de Esperanto.
11. ¿Quién puede llamarse Congreso Nacional de Esperanto en
12. Si ha llegado ya el tiempo de que H. E. A. tenga periódico oficial.
13. Estado de H. E. A. e información de sus cuentas, según el artículo 5.º
14. Formación de Hispana Esperanto Instituto, según las Bases del Congreso de Madrid, y su funcionamiento, según el artículo 7.º
15. Petición al Excmo. Señor Ministro de Instrucción Pública para la libre introducción del Esperanto en los Centros docentes oficiales.
16. Proposición de D. Benigno Luna sobre organización.

PROGRAMA DEL CONGRESO

DÍA 5 DE NOVIEMBRE DE 1928

A las diez de la mañana: Misa y sermón en Esperanto por don Mariano Mojado.

A las once de la mañana: Sesión de apertura del Congreso con asistencia de las Autoridades y Banda Municipal.

A las tres de la tarde: Visita al Alcázar.

A las cuatro de la tarde: Visita a la Catedral y subida a la Giralda.

A las cinco de la tarde: Visita oficial al Ayuntamiento, que obsequiará a los Congresistas con un delicado «lunch» y entrega por el Comité de Turismo de la «Guía Artística de Sevilla», editada en Esperanto.

DÍA 6 DE NOVIEMBRE


A las nueve y media de la mañana: Sesión general del Congreso.

A las doce de la mañana: Sesión de la Liga Española de Ferrovios Esperantistas.

A las dos de la tarde: Visita a varios monumentos de la ciudad.

DÍA 7 DE NOVIEMBRE

A las diez y media de la mañana: Fiesta literaria en el teatro Lloréns; Juegos florales esperantistas con su Reina y Corte de amor, integrada por señoritas del Grupo Esperantista Sevillano; distribución de premios y lectura de algunas poesías, entre ellas el «Canto a Sevi-



Preĝejo de l'kastelo.—ARACENA

lla» y «Canto a España». En este acto se colocarán los lazos conmemorativos de este Congreso, a las banderas o estandartes esperantistas que concurren.

También tomará parte en tan simpática fiesta la renombrada Banda Municipal de Sevilla, que amenizará el acto.

A las dos y media de la tarde: Vísita al Parque y Palacios de la Exposición Ibero-Americana.

A las cinco y media de la tarde: Sesiones finales del Congreso.

DÍA 8 DE NOVIEMBRE

A las ocho de la mañana: Excursión a Aracena con visita al Monasterio de San Isidoro del Campo, ruinas del anfiteatro romano de Itálica y famosa Gruta de las Maravillas.

(Esta excursión dura todo el día y se realizará en cómodos autobuses, siendo el precio del viaje incluido billete, visitas a los lugares indicados y comida en Aracena, el de 23 pesetas.)

DÍA 9 DE NOVIEMBRE

A las nueve de la mañana: Excursión a Carmona, con visita a la famosa Necrópolis romana y al interesante Castillo de Alcalá de Guadaira.

(Esta Excursión se efectuará por el mismo servicio de autobuses, y su coste, incluido billete, visitas y comida en Carmona, es de 12 pesetas.)

A las cinco de la tarde: Sesión de clausura del Congreso y despedida de los Congresistas.

Nota. — Probablemente tendrá lugar una fiesta típica en honor de los Congresistas, que se detallará oportunamente, y la imposición de la Medalla del Trabajo concedida a nuestro samideauo de Cheste don Francisco Máñez.

CONCURSO LITERARIO INTERNACIONAL ESPERANTISTA

Reina de los Juegos florales: Srta. Enriqueta Escacena Bermejo.

Corte de amor: Srtas. María Rodríguez, Carmen Rodríguez, María Garzón Rufo, Rosario del Pozo, Dolores del Pozo, Aurora Ortega, María Jesús Escacena y Rosario Rodríguez.

Paes: Niñas Carmelita Rodríguez y Asunción Fuentes.

Mantenedor: D. Mariano Mojado.



Pordo de l'Epistolo. Preĝejo de l'kastelo.—ARACENA

DELEGACIONES REGIONALES

(Por orden alfabético de regiones)

Andalucía.—Don Francisco Azorín Izquierdo, en Córdoba; don Serafín Baudín Agüero, en Málaga; don Rafael Fiol Paredes, en Jerez de la Frontera (Cádiz); don Francisco García Merchán, en Cádiz.

Aragón.—Don Manuel Maynar Barnolas, en Zaragoza; don José Artigas Lasala, en Huesca.

Asturias.—Don Eduardo J. de Castro, en Gijón (Oviedo); don Antonio Jiménez Mora, en Oviedo.

Castilla la Nueva.—Don Benigno de Luna y don Emilio del Barrio Martín, en Madrid.

Castilla la Vieja.—Don Venancio Girau, en Santander; don Luis Flórez González, en Segovia; don Ignacio Casas Riaño, en Burgos.

Cataluña.—Don Rómulo S. Rocamora, don José Anglada Prior y don Francisco Gorgues Torredelot, en Barcelona.

Extremadura.—Don Fernando Redondo, don Rodrigo Almada Rodríguez y don Nicolás de Pablo, en Badajoz.

Galicia.—Don Andrés Castro, en Pontevedra; don Salvador Oliván, en El Ferrol (Coruña).

León.—Don Filemón de la Cuesta, en León.

Valencia.—Don Andrés Picó, don Manuel Caplliure Ballester y don Fernando Soler Valls, en Valencia.

Vasconia.—Don Eugenio Lunate Pérez, en Baracaldo; don Manuel Elezcano y don Luis Otaola Faón, en Bilbao.

Baleares.—Don Juan Barceló Andreu, en Palma de Mallorca.


Canarias.—Don Antonio Llinás, en las Palmas.

OBSERVACIONES IMPORTANTES

Excursiones.—Como tendrán lugar por autobuses de 25 plazas, conviene que los que vayan a tomar parte en ellas, avisen con cierta anticipación, para tener la seguridad de conseguir billete, pues un autobús no lo puede improvisar la Empresa en veinticuatro horas, como ocurre en el ferrocarril que se puede agregar un vagón a última hora, y tampoco en todos los trenes.

Fiesta de las Banderas.—Con el fin de tener tiempo suficiente para la confección de los lazos conmemorativos de este Congreso, que se colocarán a las banderas o estandartes esperantistas que concurran, se ruega a los Grupos avisen antes del día 15 de octubre próximo al Comité local organizador en Sevilla, de que van a asistir con sus enseñas.

Hospedajes.—Los hay desde «seis» pesetas en adelante y para mejor organización pueden los señores Congresistas comunicar al



Araba turo. Preĝejo de l'kastelo.—ARACENA

citado Comité organizador la clase o precio que prefieren, para cuando lleguen a Sevilla no tengan más que dirigirse a sus respectivos hospedajes.

Ferrocarriles.—Se aconseja utilizar para largas distancias los billetes kilométricos que permiten viajar en los trenes rápidos en tercera clase, cosa que no ocurre con la Tarifa de Congresistas, siendo la diferencia de precio entre ambos muy reducida.

La víspera y primer día del Congreso habrá a la llegada de los trenes en el interior de las estaciones de Sevilla, junto a la puerta de salida, Comisiones de samideanos para acompañar y dar toda clase de facilidades a los Congresistas.

Se ruega que todos los miembros del Congreso lleven consigo para todos los actos su correspondiente tarjeta de Congresista.

Como la práctica de Congresos anteriores, tanto nacionales como internacionales ha demostrado que el dejar todos los avisos o encargos para última hora no da lugar más que a entorpecimientos y disgustos, este Comité local organizador aconseja, o mejor dicho, pide, que se tengan muy presente las anteriores observaciones por los señores Congresistas que nos honren con su visita, a cuyo fin deberán avisar por lo menos con una semana de anticipación para el asunto que deseen, en la confianza que de hacerlo así laborarán en beneficio propio y contribuirán a la mejor organización y esplendor de esta Asamblea Nacional Esperantista.

¡Esperantistas, Sevilla os espera!

30 de septiembre de 1928.

El Secretario-tesorero


Carlos Martínez Fernández

Nota.—Dirección para toda clase de correspondencia, envío de cuotas o consultas:

KONGRESO DE ESPERANTO

Calle Rioja, 25,

SEVILLA (España)




Paroĥejo de Aracena

TUROJ DE SEVILLA

La Giralda (Ĥiraldo).—Per tiu nomo estas konata la belega kaj gracia turo de la Katedralo ĉar ĝi finiĝas per granda statuo, kiu reprezentas la Fidon, kaj kiu turniĝas laŭ aerfluo kiel direktmontrilo de la vento. Oni opinias, ke tiu ĉi turo apartenis al antikva moskeo. Oni komencis ĝian konstruon je 1184, kaj oni ĝin finis je 1195. Ĝia unua korpo estas alta je 69,66 metroj kaj ĝis la jaro 1395 ĝi ne finiĝis per kapitelo kovrita de emajlitaj brikoj, sur kiu estis surmetataj unu sur la alian, de plej en malplej grandan, kvar orumitaj sferoj, kiujn faligis uragano la 21^{an} de aŭgusto de tiu jaro mem. Dum la XVI jarcento, laŭ desegno kaj direktado de lerta arkitekturo Ferdinando Ruis, oni aldonis kvar korpojn al la turo, el kiuj la unua, sonorilejo, estas sekvo de la primitiva, lerte ornamita. La dua, en kiu estas la horsonorilo, estas dorika, kvadrata, kaj en ĝia friso prezentas la skribaĵon: *Turris fortissima-Nomen-Domini* (La nomo de Dio estas firmega turo). Ĉiu el la kvar latinaj vortoj aperas sur respektiva fasado de la korpo. La du sekvantaj korpoj estas rondaj: unu jonia kaj la alia korinta. La tuton kronas bela kupolo, sur kiu sidas la bronza bazo de la grandega statuo, ankaŭ bronza, jam aludita, alta je 4 metroj kaj peza je 1288 kilogramoj, el kiuj 92 apartenas al la palmobranĉo, kiun tenas la statuo en ĝia dekstra mano kaj estas la ventdirektilo. La konstruo de la kvar korpoj estis finata je 1568. La turo, do, estas alta je 97,52 metroj. Oni povas tre facile supreniri ĉar anstataŭ ŝtuparo ĝi havas deklivojn ĝis la sonorilejo, 35 larĝajn deklivojn. Je 1400, antaŭ la reĝo Henriko III^a, oni starigis la sonorilhorloĝon, unu el la plej antikvaj de Hispanujo, sed je 1765 oni anstataŭis ĝin per la nuna, kiu estas belega maŝino laborita de monaĥo Jozefo Cordero. La arabaj ornamaĵoj de la unua korpo, same kiel ĝiaj balkonoj, kapiteloj, kaj cetero allogas la atenton de kleraj turistoj ĉar ili estas specimenoj de la plej ora epoko de la araba arkitekturo.

Turo de Sankta Marko.—Inter la maŭraj turoj de Sevilla, ĉi tiu estas unu el plej rimarkindaj, esceptante la antaŭan, se oni atentus ĝian desegnon, ĝiajn graciajn proporciojn kaj delikatajn ornamaĵojn. Ankaŭ ĝi estis turo de moskeo, kiu staris sur la sama loko de la nuna preĝejo. Malbeligas ĝin ridinda sonorilejo surmetita tre poste kaj apogmureto



Grandaltaro. Paroĥejo de Aracena

kvazaŭ balustrado ĉirkaŭ la supra parto de la turo, supren de la araba friso, kaj anstataŭas la dentajn surturotojn, kiuj certe estis la finaĵo de la turo laŭ la maŭra stilo.

Oni ne scias la daton, kiam oni ekstarigis ĉi tiun belegan turon, kvankam oni konscias, ke ĝi apartenas al la plej arta epoko de la maŭraj konstruaĵoj de Sevilla.

Ĝia bazo estas kvadrata, kaj ĝi estas tute el brikoj. La kornico kuŝas sur romanikaj kapetoj; kredeble konstruitaj, kiam oni anstataŭis la unuan araban finaĵon per la nuna kvazaŭ balustrado.

Estas domaĝe, ke kiam oni faris antaŭnelonge la renovigon de la turo, per kiu oni malaperigis kelkajn ridindajn malbelaĵojn, kiujn oni aldonis dum la lastaj jarcentoj, oni ne malaperigis ankaŭ la sonorilejon de la horloĝo kaj la kvazaŭ balustradon kun la kornico tiun subtenanta, ĉar ambaŭ aldonitaĵoj tre malbeligas tiel interesan monumenton.

La friso, kiu ornamas kaj ĉirkaŭas la turon konsistas el koloneto, surportantaj interplektitajn arkarojn el brikoj la plej rimarkindaj de la plej bona araba stilo.

Belaj arabaj fenestroj malfermiĝas ĉe la kvar fasadoj kaj ne je la sama alteco. Tiuj de la okcidenta fasado, kiu estas la ĉefa, konsistas, la plej alta, el belega *añimezo* (araba balkono) konsistanta el du dentaj arkaĵoj, kiujn surportas centra koloneto el blanka marmoro kun kapitelo, la tuto enkadrigita de maŭra ornamaĵo nomita *arrabáa*. Sub tiu priskribita balkono estas alia konsistanta el du pli rondaj arkaĵoj sur kies angulaĵoj estas malgrandaj pecoj el blankaj, nigraj kaj verdaj brikoj, kvazaŭ vitraĵoj, kiel mozaiko: unua elmontraĵo, kiun ni konas, pri apliko de emaljado sur brikoj, kiu famigis tra ĉie ceramikistojn de Sevilla.

Ĉe la muro de la maldekstra navo de la preĝejo estas pordeto al la turo. La ŝtupoj ĉirkaŭas spirale dikan centran foston, kaj alvenante kontraŭ ĉiu muro formas belegan plafonon el arkaĵoj, kupoletoj, k. t. p.

La sonorilo de la horloĝo estas unu el plej gravaj sonoriloj de la urbo. Ĝi montras kuriozajn reliefajn skribaĵojn, unu el ili montras la daton de ĝia fabrikado latinlingve:

•S. P. Q. H.—BONO PUBLICO SUA PECUNYA ANN, SALVATORI NRI, CHRISTI 1553 FACIENDUM CURAVIT.›

Ankaŭ havas krucon sur kies brakoj estas la antikva blazono de Sevilla.

GROTO; DE LA MIRINDAĴOJ.—ARACENA



Ungegoj de la leonoj

Turo de l'Oro.—Tiu bela monumento staras sur la maldekstra bordo de la Gvadalkiviro, kaj estis konstruata de la araba arkitekturo Cid-abu-el-Ola, kaj de tiam, de la jaro 1920, estis nomata *Borg-alldsojeb* (Ora turo), ĉar ĝi estis ornamita de tre brilantaj emajlitaj brikoj kiuj similis el oro, kiam la suno frapis ilin per siaj radioj. Ĝis la jaro 1821, kiam oni malaperigis la muron aŭ remparon, kiu ligis kaj komunikis la turon kun la urba pordego nomita *Jerez* (Ĥerez), ĝi ankaŭ havis rektan komunikilon kun la fortikaĵo Alkazaro.

Sur dekduangula bazo ĝi altenigas sian unuan dikan, masivan korpon kronitan de surtaretoj, kaj sur ĉi tiu korpo staras alia gracia korpo, kiun kronas gracia kupoeto el emajlitaj brikoj.

Ĉi tiu turo estas tre historia, precipe dum la tempo, kiam loĝis en Sevilla Petro I de Kastilujo, ĉar en ĝi li gardis siajn riĉaĵojn, kaj en ĝi loĝis Sinjorina Moŝto Aldonza Koronel.

Trinidad Soriano

RIMARKO

Ĉi tiun artikolon verkis je majo de 1918, antaŭ dek jaroj, por «Hispana Esperantisto». S-ro Trinidad Soriano, eminenta arkitekturo de Sevilla, grandanima Zamenhofano, spertega esperantisto, nelacigebla propagandisto, fervora kaj obstinega pioniro de Esperanto en Andaluzio, fondinto de la Andaluzia Federazio, vera animo de la Grupo de Sevilla, kies diĉiploj, sekvante la rektan vojon montritan kaj instruitan de li tutplene honoros lian memoron okazigante la sukcesplenan VIIan Nacian Kongreson de Esperanto, dum kiu la hispana esperantistaro kunveninta en Sevilla nepre devos pilgrimi al la tombejo, kie kuŝas liaj restaĵoj, kaj meti kronon sur lian tombon, dum ja esperantaj flagoj, kliniĝinte, per siaj ŝtofoj, milde kisas la tombon.

LA ARTO EN ARACENA

Sur la monto, kies internaĵo kaviĝas laŭ la Groto de la Mirindaĵoj, staras preĝejo, arta juvelo, kiun starigis la Kavaliroj de l'Templo. Ĝi apartenas al ogiva stilo kaj ĝin oni ekkonstruis je la XIII jarcento, kaj pro la longedaŭra konstruado, iom post iom, ĝi aperigas la evoluadon de la stilo deiranta de la romana en la lastan gotikan, kaj laŭ tiu evo-



Plafono de l'banejo de Johano
(G. de la M. — ARACENA)


luado estas la pordo de l'Epistolo, tre sopra je ornamaĵoj, tiu nomata Reĝa, severe ornamita, kaj tiu de l'Evangelio kun abunda riĉa ornamajaro.

Kunigata al preĝejo staras majeste kaj plengracie maŭra turo tre bone konservita, mirinda je belo, restaĵo parolanta al ni pri la malaperintaj maŭraj konstruaĵoj, kaj kiu estas iom simila je la *Hirald* kaj aliaj turoj de Sevilla: La Kavaliroj de l'Templo metis sur ĝin sian

krucon. Ĉi tiu preĝejo akiras pli kaj pli grandegan artan valoron, ĉar la artema kaj tre riĉa grafo de la Turoj de Sanchezdalp amasigas en ĝin artaĵojn ĉiajn, malnovajn kaj novajn: pentraĵojn, mirindajn ceramikajojn, grandiozajn kradojn... En la kapelo de la epistola flanko oni povas admiri grandiozan altaron de la XV jarcento, kaj grandaj kaj tre artaj kradoj diverskolorigitaj kaj orumitaj fermas tiun kapelon. Oni forĝis en Sevilla la kradojn. Ĉi tiu kapelo estos tombejo por la familiaĵoj de la Grafo, kaj la kapelo de l'Evangelio estos tombejo de kleraj enlandanoj, en kiun oni entombigos unue la restaĵojn de la tre klera aracenido Jozefo Nogales. Kradoj, ceramikaĵoj, k. t. p., por ĉi tiu kapelo jam estas menditaj.

Mirigas la grandioza ceramikaĵo el malnovaj emajlitaj brikoj de Sevilla, kiu ornamas la murojn de la preĝejo ĉirkaŭen kaj alten je du metroj kaj duono, kun belegaj reliefoj koncernantaj la Pasian Vojon, kiuj estas gotikaj kaj modernaj sed rimarkindaj. Impona pro arto estas la krado de la ĉefkapelo, kiun forĝis en Toledo Julio Pascual, kiu revivigis mirinde ĉi tiun rimarkindan hispanan arton.

Oni ekkonstruis la ĉefpreĝejon je la mardo 15.^a de septembro de 1528, sed oni haltigis la konstruadon kaj la preĝejo restis nekompleta bedaŭrinde. La parto konstruita, pro sia mirinda arkitekturo kun belstila riĉa ornamajaro, konsciigas kiel grandioza estus ĉi tiu preĝejo se oni ne estus interrompinta la konstruadon. La granda altaro estas verko farita ĉe la laborejo de la tre fama skulptisto Juan Martínez Montañés, kies manoj transformis la lignon mirinde laŭ mirigantaj skulptitaĵoj; ĉi tiun verkon planis kaj skizis la majstro, ĝi konsistas el proksimume cent figuroj skulptitaj de liaj disĉiploj, sed la senmorta majstro skulptis la krucumiton per kiu finiĝas la grandaltaro. Dum tri jarcentoj ĉi tiu ĉefverko de l'skulptarto restis neatentata ĝis antaŭ malmulte da tempo, kiam Manuel Siurot, vizitante la preĝejon per potenca binoklo kaj profitante horon, kiam la sunlumo lumigis la grandaltaron, rimarkis la artan grandvaloron de la verko: aperas la Krucumito momentojn post la morto, post la lasta elspiro kun mildeco sindonema de martiro pardonanta kun sereneco de senmakululo eniranta sian eternan regnon per la vera memofero. La kapo elvidigas mirigantan superegon; la bruston, la lastan movon de la vivo kiu estingiĝas suferinte ĉiajn dolorojn; la brakoj etendiĝas ameme, finiĝante per delikataj perfektaj manoj, kies fingroj ŝajnas fleksiĝadi malrapide en la



Salono de la brilantoj
(G. de l'M.—ARACENA)

najlojn; la kruroj, skulptitaj laŭ supergenia arto, prezentas mildan rigidecon kvazaŭ jam ripozante post la doloro pro la najlo traboranta liajn piedojn. La esprimo de la vizaĝo, ĉe kies buŝo ŝajnas malvarmiĝi la kvazaŭ ŝaŭmaĵo eligata de la agonio elspiro, estas tiel mirinde reala ke la rigardanto nepre miregas. La cedra ligno de la skulptaĵo donas la emociion de la homa karno. Severececo spiriteco, mirinda anatomio, elegantececo, realeco, asketismo, beleco materia kaj spirita por Kortuŝi kaj allogi ĉu al mistika fervoro, ĉu al estetika rigardado, estas en tiu ĉi ĉefverko, tiel altvalora, kiel la majstraj verkoj de la Grekoj. Grekan harmonion kun sento kaj pasio genie akordigas Donatello, kaj kulminaciigas Miguel Angel, sed al ĉio Martínez Montañés, per ĉi tiu verko aligas la doloran esprimon de tragika realaĵo, per kiu la skulptisto, kun la kolorigo, trafas efektivece la perfektecon kompletan. Ne estas parteto, ero el ĉi tiu Krucumito, kiu ne vidigu la vivon kaj la doloron.

Ankaŭ posedas Aracena altvalorajn pentraĵojn, el ili precipe *Sankta Gertrudis* de Murillo.

GROTO DE LA MIRINDAĴOJ EN ARACENA

IMPRESOJ DE TURISTO

Mi konas aliajn similajn grotojn, kiaj estas tiaj de Aracena pro kio mi opiniis ne miri vizitante ĉi tiun.

Mi multe estimas la afablan inviton, kiun faris al mi la Prezidanto de la Patronaro por la Groto, dank' al kiu mi konis tiom da mirindaĵoj. Ĝusta tutplene estas la nomo, kiun oni donis al la Groto, kaj la turisto, ĉiam avida je emocioj, trovas ĉi tie, meze de surprizoj, miroj kaj ekkrioj, sensaciojn, emociojn, pri nekonataĵoj, pri nesupozitaĵoj, impresojn kvazaŭ eksterordinaran nemondan revon.

Ĉu subteran kastelon, laŭ orienta fantazio? Ĉu palacon de feinoj, de ensorĉitaj princinoj? Ĉu magian konstruaĵon kun salonoj lumigataj de fulmobrilaj reflektaj de brilantoj kaj smeraldoj, kun ĉambroj pavumitaj el arĝento kaj filigrana maŝo enkatentanta riĉan ŝtonaron, kun plafonoj montrantaj neimageblajn arabojn, de kiuj pendas kvazaŭ kurtenoj damaskigitaj kaj kristale travideblaj; kun kolonoj el alabastro pendantaj kaj finiĝantaj akrepinte, aŭ tordiĝantaj, similigantaj inversigitajn kandelabrojn kun iliaj kandeloj, kun koridoroj kaj galerioj, tra kiuj oni



Muro de l'salono de tapiŝoj
(G. de l'M.—ARACENA)

aliras al novaj ĉambroj kaj sekretejoj, kie la filtrita akvo milde amasiĝas ĉe parfumita banejo por sultanino kaj tiel pure kristale, klare, la akvo amasiĝas, ke ĝi speguliĝas same, kiel la plej perfekta spegulo.

Tia estas la impreso de magia revo persistanta ĉe mia menso, ke ĝi

ĉiam restados, kiel vizio grandioza kvankam reala kaj granda kaprico de l'naturo.

Mi promesis verki ion pri la Groto, kiel koncian simplan gvidilon por la vizitanto. Iujn fotojn, mi tion celis, sed mi ne tion povis fari, ĉar en mia penso ne ŝprucis konceptoj povantaj esprimi klare ĉion, kio en mia retino gravuriĝis. Vana celo priskribi ĝin; estas necese viziti ĝin por senti serion da surprizoj kaj emocioj.

La geologia formado de l'stalaktitoj kaj stalagmitoj laŭ ĝenerala amaso estas pli difinita aŭ preciza en aliaj grotoj, kiujn mi konas, ol en ĉi tiuj; kaj oni povas diri, ke ĉi tiuj estas pli malnovaj ĉar eble la filtrado de la kalka akvo estas pli regula ol en tiu de Aracena; sed la Groto de la Mirindaĵoj prezentas la karakterizon de juneco, de pli malrapida formado, de filtrado pli varia, kaj jen kial ĝiaj kristaliĝoj estas tiel diversaj kaj nekompareble belaj.

Supermezure surprizas la neĝa blankeco el iuj kaj tamen ilia diamanta travidebleco. Ĉi tiuj tipaj kristaliĝoj estas la plej multenombraj, sed ankaŭ la plej variaj: stalaktitoj, stalagmitoj, floriĝoj, vegetaliĝoj.

La karnoroza koloro etendiĝas samegale sur strangaĵoj, kvazaŭ homtrunkoj interplektitaj, arbotrunkoj kaj arbustoj, kariatidoj kaj kolonoj.

Ĉe galerio kaj ĉambro malvastaj, ĵus elkovritaj, regas la turkisblua koloro sur vegetaliĝoj kaj floriĝoj.

La plej vasta galerio estas kvazaŭ salonego larĝa kaj alta pli ol kvar dek metrojn. Ĝi entenas tre profundan lagon, larĝan sesdek metrojn kaj tie oni admiras, krom la kristaliĝoj aluditaj, la muskajn tavolojn en la planko, kaj la kvazaŭ kurtenojn, kun ruĝaj strioj, hazarde pendantajn de la plafono.


La Groto entenanta tiom da mirindaĵoj estis disponata por la turismo dank' al la sindonemo de l'Markiza Moŝto de Aracena kaj de Don Johano de l'Cid López; ĝi havas oportunajn irejojn kaj ŝtuparojn al diversaj galerioj. La lumigado estas elektra, tre sperte instalita.

J. R. M.

ALTAROJ DE LA STRATOJ

Tre rimarkindaj kaj tipaj estas la altaroj, kiuj, de sur la muroj de domoj, palacoj, k. t. p., de Sevilla, ĉe ĝiaj mallarĝaj zigzagaj stratoj, pendas, kaj kiujn ĝenerale ŝirmas elstarantaj tegmentetoj, ornamas flo-

roj kaj plantoj kaj dumnokte lumigas oleolampoj. Ĉu statuetoj, freskoj, aliaj pentraĵoj, ĉu bildoj el emajlitaj brikoj, estas la ĉefajo de tiuj altaroj, kiuj posedas legendojn, tradiciojn, difavorojn. k. t. p. Ili estas



Salono de l'orgenoj
(G. de l'M. ARACENA)

multenombraj, malnovaj kaj novaj kvankam multaj malaperis laŭ la modernigo de la urbo postulis. Multaj havas siajn specialajn preĝojn, kaj antaŭ sub ili ofle haltas speciale trairantinoj por preĝi la difinitan preĝon laŭ la altaro; jen du el tiuj preĝoj specialaj kiujn poste la fervorulo aŭ fervorulino akompanos per kutimaj ordinaraj preĝoj:

Kvankam iru mi rapide,
trapasante tie ĉi,

ne forgesas mi Jesuon
 krucumitan nur pro mi.
 Blanka kolombet' adiaŭ.
 Dipatrino, plian fojon,
 ja min trafu via ben',
 ĉar mi sekvas mian vojon,
 iras hejmen sen deten',
 Vi ĉeestu mian morton!

Benitaj animoj
 de Limo, Callao.
 Nenia vizito,
 kaj preĝo nenia;
 jen preĝo la mia:
 min helpu, min gardu
 favoro tre Dia!

Ĉi tiun lastan oni devas ripetadi kaj akompani de preĝo «Patro nia» ripetota.

ATENTU!

La membroj de l'Instituto, kiuj ne ĉeestos la Kongreson de Sevilla, bonvolu rajtigi skribite iun kamaradon ĉeestontan por la voĉdonado.

La samideanoj membroj de H. E. A. neĉeestontaj la Kongreson, devos regione nomi Delegiton, kiu havos tiom da voĉdonoj, kiom da membroj de H. E. A. ne ĉeestos la Kongreson, kaj okaze ke neniuj regionano ĉeestu, ili povos rajtigi ĉeestantan samideanon de alia regiono.

Al abonantoj de «Hispana-Esperanto».

Ĉi tiun gazeton dissendas la Sekretario de H. E. A., S-ro. Mariano Mojado—Abascal, 13, pral. A—ĉar la tuta eldono estas deponata ĉiunmonate en la Sekretariejo de H. E. A.; tial plendojn pro nericevo oni devos sendi al la Sekretario de H. E. A.

PRI PLEJ SIMPLA KAJ EFIKA ORGANIZO DE LA TUTMONDA ESPERANTO-MOVADO

La kerno de nia movado estas la INDIVIDUO, la ESPERANTISTO, kiu nepre devas aparteni al Tutmonda Esperanto-Movado, se li sin sentas vera Esperantisto, pagante malgrandan jarkotizon, kiu liveros al li la Membrokarton kvazaŭ ATESTON PRI CIVITANECO DE LA MONDO; tute same kaj nepre, li devas aparteni al la tutlanda Esperanto-Unuiĝo, pagante ankaŭ malgrandan jarkotizon, por antaŭenpuŝi Esperanton en la respektiva lando, precipe por interesigi la respektivan Registaron, helpante la ĝeneralan Esperanto-Movadon. Nepre oni devas konscii ĉi tiujn du ĉefajn fakojn de nia Movado: malgrandan (nacian), grandan (universalan), kies kotizoj devas ne superi jare valoron da 5 pesetoj (egalvaloran sumon en aliaj landoj), el kiuj duono estos po ĉiu fako. Tamen, Esperantistoj povas, laŭ plaĉo, loke, teritorie aŭ regione, ariĝi; eldoni gazeton; starigi kotizojn, k. t. p., kaj rekomendinde estas tia ariĝo, eĉ profesie kaj ideale, por entrepreni loke, regione, profesie, ideale, la ĝeneralajn aferojn eĉ la specialajn en siaj respektivaj agadkampoj, helpante tiel la ĝeneralan Movadon, atentante, ke same la nacia organizaĵo kiel la tutmonda nepre devas esti neŭtralaj socie, politike kaj religie.

Tiu ĉi Tutmonda Esperanto-Movado havos nur ĝeneralan Sekretaron, Kasiston kaj Oficiston aŭ Oficistojn nepre necesajn, por la funkciado de la Centra Oficejo, kiu prezentos ĉiujare dum la Kongreso la Kalkulojn, kaj neniu el tiuj rajtos voĉdoni, ĉar ili ricevos salajron de la Organizaĵo; tamen, la Sekretario kaj la Kasisto rajtos paroli. La Organizaĵo ne havos propre diritan Estraron, ĉar por la kunvenoj oficialaj dum la Kongresoj, al kiuj la Naciaj Asocioj sendos rajtigatajn Delegitojn, ĉi tiuj elektos la Prezidanton kaj ceterajn postenulojn el si mem.

Ni ne povas daŭrigi nian aferon sub la normoj nuntempaj, kiuj ne estas favoraj al progreso de Esperanto; eĉ U. E. A. ne progresas, laŭ mia opinio, ĉar ĝi ne kontentigas la samideanaron: la Jarlibro aperas tre malfrue, la gazeto ankaŭ malfruigas kaj ne multe interesas la abonantaron, la kotizoj estas tre altaj. Pro tio, mi opinias, ke U. E. A. povus transformiĝi iomete kaj gajni multe, helpante al plej simpla kaj poten-

ca organizo de la Tutmonda Esperanto-Movado: ĝi povus fariĝi la sola universala organizo pritraktita, starigante la jarkotizon 2,50 pesetan (aŭ egalvaloran) por simpla membreco liverante nur la membrokarton, rajtigante ĉi tiun membrecon profiti servojn per aĉetado de servokuponoj, kies prezon oni difinas; fiksante prezon por la Jarlibro, kiu entenos plenan adresaron de la Esperantistoj apartenantaj al la Organizaĵo, gravajn datojn de nia movado kaj aliajn utilaĵojn; interkonsentante kun *Heroldo de Esperanto* por ke ĉi tiu aperigu ĉion necesan kaj utilan pri-por-pro la Movado.

Tiuj sinceraj opinioj, pri kiuj mi pli-malpli aŭdis en Dancigo kaj en Antverpeno, ne celas atenci personojn, mortigi organizaĵojn; celas nur veki atenton ĉies al transformigo de la nuna organizo de la Tutmonda Esperanto-Movado laŭ plej efika kaj unueca sistemo en plena konkordo kaj reciproka solidareco.

Julio Mangada Rosenörn


RECENZEJO

»La Humanitaristaj Principoj kaj la Internacio de l'Intelektululoj« de la rumana verkisto Eugen Relgis, el la rumana lingvo tradukita de S Prager, 14 × 8 cm., 47 paĝas. Tre interesa teksto sufiĉe simila je »Homaranismo« de la Majstro kaj je la principoj por la Civitanoj de la Mondo, celanta unuigi la tutmondan intelektularon al vera Humanitarismo en kiu la individuo estas memstara, libera sed kunlaboranta al tutmonda frataro, por kiu ankaŭ la aŭtoro alvokas la klarvidajn laboristojn. La traduko estas laŭ tre korekta lingvo kaj bonstila; tial la verketo estas rekomendinda. Prezo: 0,50 sv. fr., mendebla de la Belga Esperanto-Instituto, 11 Kleine Hondstraat. Antverpeno.

»BES a Adresaro de Esperantistoj el Ĉiuj Landoj« por 1928—7.^a eld. 11 × 14 cm., eldonita de Bohema Esperanto Servo. (Moravany, Ĉeĥoslovakujo). Tre belaspekta kaj interesa adresaro, sur kiu ĉiu povas sin anonci eĉ aperigi sian portreton per malgranda pago: 0 50 sv. fr. kostas enpresigo de nomoj adreso kaj pri kio oni deziras intersanĝi; 0,50 sv. fr. por aperigi la portreton. 10 sv. fr. kostas tutpaĝa anonco; 5 sv. fr., 2,50 sv. fr. duonpaĝa kaj kvaronpaĝa repektive. Ĉiu pagu antaŭ la fino de la jaro kaj ricevos je la proksima printempo la Adresaron. Petu aligilon al la dirita adreso.

ĈE LA HEJMO DE L'MAJSTRO

Kia kore milda ĝojo!
 Lidjo kaj Sofio,
 La filinoj de l'Majstro,
 Sen ceremonio,
 Nin akceptas ĉe la hejmo
 De la patro kara,
 Per gastemo tre sincera,
 Tute malavara;
 Ridetante bonkorege,
 Kun esprimo varma
 De Homaranismo tiel,
 Kiel ankaŭ ĉarma.
 Jen unue lia ĉambro,
 Ĉio restas same,
 Kiel kiam li laboris
 Senripoze, ame,
 Grandanime, por Homaro.
 LIA bellaboro
 Estis lumo al okuloj,
 NOVA SENT' al koro.
 Li kuracis malsanulojn,
 Jen, do, l'aparatoj.
 Tie LINGV' INTERNACIA
 Faris HOMOJN FRATOJ;
 Tie Majstro vivis, mortis;
 Sed ankoraŭ restas
 Tie lia la spirito,
 Kaj kun ni kunestas.
 Ni alian ĉambbron paŝas;
 Memoraĵojn vidas,
 Ili pravas, ke la Homoj



La Ĥiraldo

Je la LINGVO fidas,
Kaj eĉ iuj Registaroj
Ankaŭ: Pergamenoj,
Multaj aliaĵoj pruvas
Tion, eĉ ordenoj.
Kaj klarigojn de l'filinoj
Ĉiuj kore ŝatas,
Dum ĉe niaj brustoj koroj
Religie batas.
Kiel fino de l' ekstazo,
Kiun ni plenĝnas,
Kiu en tutplena revo
Korojn ĉies skuas,
La filinoj de la Majstro
Nin regalas ĝoje:
Dum regalo ni deziras
Foje kaj refoje,
Vidi nin en Antverpeno,
Je l'venonta jaro;
Ke ĉi tion ne frakasu
Malagrabla baro.
Sed la tempo rapidpasas,
Ĉio limon havas;
Ankaŭ nia la kunveno,
Kiu nin plenravas.
Adiaŭoj lastaj venas,
Kaj miksiĝas diroj
Emociaj, tre sincere
Koraj, kun sopiroj!...

Julio Mangada Rosenörn

Verkita sur la «Pologne», tra la Baltika Maro, la 13.^{an} de Aŭgusto
de 1927.

AL AMIKO

Estas tia via amo al studo kaj tiamaniere juste plenumas vi viajn devojn, ke vi sufiĉe bone antaŭeniris la vojon al homa perfektigo. Vi jam tenas la laborilojn, kiuj estas necesaj por atingi la Klerecon, la Justecon, la Kuraĝon, la Saĝecon kaj la Sindonemon, per kiuj vi vin montros pura el ĉirkaŭantaj malvirtoj kaj el priokupiĝoj, kiuj vin sklavigis, kaj kiuj endormigadis vian senton pri indeco. Vi jam staras ĉe loko, kvazaŭ potenca fokuso, de kiu vi tute klare vidas tiujn, kiuj celadas ekspluati la Homaron edukante tiamaniere, ke ili detruas la senton, kiu nur ĝermas ĉe la koroj de bonuloj samtempe kleruloj.

Kiam oni atingas la lokon aluditan, oni povas jam ekkrii: mi estas Homo, ĉar nenion mi kredas ĝis kiam prava rezonado kaj konstatado min konvinkis; ĉar mi ne konsentas, ke iu pensu kaj agu tion, kion mi devas pensi kaj agi.

Benata estu la dubo kaptinta vian spiriton kaj metinta vin en tiun fokuson same, kiel Johanon la Baptinton. Serĉu, serĉadu, kaj vi trovos la lumon: unuo ne estas nombro kaj tamen ĝi estas la firma bazo de la senfina nombraro de ĝia aplikado. Rimarku la nombron 5, kiu entenas la unuan paron kaj la unuan malparon, kiun ŝatis la patrino de la Dioj; jen la nombro 7, sankta nombro, kiu konstante aperas ĉe la scienco, la historio, la religioj...

Certe, kiam vi decidis entrepreni ĉian laboron, ne vin gvidos egoismo aŭ nura scivolemo, sed la celo plibonigi vian staton kune kun tiu de viaj similuloj ĉu ne? Certe vi konscias la multenombregajn bonajn, kiujn liveras al ni nia unuigo, la pureco de niaj koroj kaj la homama celo gvidanta nin, kaj certe vi spertis, ke la Malbono, kiu kaŝite iras apud la Bono, profitas ĉiun okazon de distriĝo por vin faliĝi. Sed via Konstanteco ne ĉi tion permesos, ĉar via konduto estos fidela je la egaleco kaj harmonio, kiuj devas regi la Homojn, trovante tiel kiel eble plej grandan feliĉon de la vivo. Nia intelekto pensu al komuna Bono, nia koro sentu la ĝojon pro la Bono; nia parolo propagandu la Bonon; niaj manoj agu por la Bono; niaj piedoj irigu nin al Bono; kaj tiel ni plibonigos kaj honoros la Homaron kaj nin mem. Ni subtenu nian celon sur la du firmaj kolonoj de Herkuleso: Homa Rajto; Homa Justeco, kaj tiamaniere ni laboros por starigi mirindan novan Mondon.

Hispane verkis L. Cervera.

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVUS ĈI TIUN GAZETON, KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIĤOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENÖRN, Glorieta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

«DON KIĤOTO» nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Santa Teresa, 16-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mendo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40 %. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO